

## Literaturo

- (1) Nolan R.L. (1979). *Managing the crises in data processing*. Harward Business Review. Marto/aprilo
- (2) Davis A.M. (1993). *Software Requirements, Objects, Functions, States* (rev.ed.). Englewood Cliffs, NJ: Prentice Hall
- (3) van Bemmel J.H. & Musen M.A. (1997). *Handbook of Medical Informatics*. Springer Verlag
- (4) WfMC. *The Workflow Reference Model*. <http://www.aiai.ed.ac.uk/WfMC/>
- (5) Rational Software Corporation (1997). *Unified Modelling Language*. <http://www.rational.com>
- (6) Nešković S. i ostali (1998). *Sistem za modeliranje poslovnih procesa* (Sistemo por modelado de aferprocedoj). YU INFO 98, Kopaonik-SRJ
- (7) Lazarević B. & Nešković S. (1998). *Metodologija modeliranja poslovnih procesa* (Metodologio de modelado de aferprocedoj). Info 2, Beograd

## Aŭtoro adreso

M-gro Ljubiša Preradović, dipl.-ing.  
 Faculty of Medicine  
 Save Mrkalja 14  
 Banja Luka  
 REPUBLIKO SRPSKA, BiH  
 <ljubopr@inecco.net>

## Priaŭtoraj informoj

**Ljubiša Preradović** estas magistro de informadiko, diplomita inĝeniero pri elektroniko, supera asistanto ĉe Katedro pri Medicina Statistiko kaj Informadiko enkadre de Medicina Fakultato en Banjaluko, al kiu apartenas ankaŭ la kunaŭtoroj: Profesoro **Rade Tanjga**, diplomita inĝeniero pri elektroniko kaj ĉefo de la supre menciita Katedro kadre de la Medicina Fakultato; d-rino **Ljiljana Latinović**, laboras en la fonduso por patologio enkadre de Klinika Centro en Banjaluko kaj nun specialiĝas pri patologio en Vieno, Aŭstrio, kaj Magistro **Vlado Đjajić**, kiu specialiĝis pri neŭrologio kaj laboras kiel supera asistanto ĉe Katedro pri Neŭrologio, dum d-rino **Suzana Varga-Krstić** estas postdiplomita studentino.

## La ribelo de Antigona en la samnoma teatraĵo de Jean Anouilh

Irina ĤALIKOVA

Ĵan' Anuj' (*Jean Anouilh*), franca dramverkisto de la XX-a jarcento (1910 - 1987), interesiĝis pri antikva greka mitologio kaj plurfoje uzis en siaj verkoj temojn de antikvaj mitoj kaj tragedioj, moderniginte ilin. La motivon de Antigona li prilaboris en la jaro 1942, dum tre malfacila epoko, kiam Francujo estis okupita de la hitleraj faŝistoj. La progresema Eŭropo arde malamis la faŝismon kaj batalis kontraŭ ĝi. Suferoplena mondo ŝajnis al multaj homoj absurda kaj la homo mem - senpova, senhelpa, soleca. Tiu atmosfero determinis Anujan al pritrakto de la nomita antikva mito.

En la dummilita tempo la Anuja verko estis komprenata de la spektantoj kiel alegorio: Antigona estis por ili heroino de la Rezistado, kaj la teatraĵo mem - alvoko al lukto kontraŭ la faŝismo.

Intertempe pasis 60 jaroj. La nova generacio, kiu ne spertis la militon, vidas la verkon de Anuj' alimaniere. Pri kio do temas reale en tiu verko? Kiam ni komparas la samtitolajn teatraĵojn de Sofoklo (496-406 a.K.)<sup>6</sup> ni vidos jenajn malsimilecojn: la verko de Sofoklo estas en versoj kaj en scienca-nobla stilo; la verko de Anuj' estas en prozo kaj en konversacia stilo. Nenio (aŭ preskaŭ nenio) en la Anuja verko translokas rolantojn en nian epokon: la aŭtoro kreas kvazaŭ ekster-tempan atmosferon. Liaj personoj ne apartenas al iu preciza epoko ("dekoracioj neŭtraj" indikas la aŭtoro). Nenio memorigas al antikva Greklando aŭ al la nuna Grekujo aŭ al alia konkreta lando: nigra robo por Antigona, hela robo por Ismena, pelerinoj por la aliaj rolantoj.

La ekstertempa atmosfero tuj donas al la verko filozofian koloron. Tamen, la neŭtra fono estas detruita de interne. La aŭtoro proksimigas la verkon al ni. Li uzas multajn vortojn, kiuj ekaperis nur en nia



XX-a jarcento. La personoj parolas pri poŝtkartoj, kafo, fuziloj, filmoj, cigaredoj, aŭtomobiloj.

Alia malsimileco: la sofokla Antigonon estis matura, dignoplena, ege bela, de ia sovaĝa beleco. Antigonon de Anuj' estas nia samtempulino kun multaj kompleksoj. Ŝi estas malgranda, malbone kombita. Ŝi tute ne zorgas pri sia aspekto kaj bedaŭras, ke ŝi ne naskiĝis kiel knabo: "Ĉu mi malmulte ploris pri tio, ke mi naskiĝis knabino?" (1, 285). Ŝi similas al aliaj, antaŭaj protagonistoj de Anuj': Eŭridika ("Euridika") kaj Tereza ("Sovaĝulino"). Same kiel tiuj ŝi ne sentas sin virino.

Ŝi amas la vivon kaj volas vivi. Ŝi ŝatas tuŝi malvarman akvon, "belan kaj puran", trinki ĝin kiam ŝi volas (1, 284), vekigi frumatene "nur por senti per ĉiuj poroj la kareson de malvarmeta matena venteto" (1, 285). Ŝi diras al sia fratino: "Same mi ne volus morti" (1, 283). Sed, malgraŭ tio, ŝi proksimiĝis al la ideo de sinmortigo. "Ĉar, ekzistenbaze de sia naturo, ebriigita de senlima libero, ŝi opinias, ke ŝi devas efektiviĝi sian propran agon, ke ŝi ne povas eviti tion" (3, 37).

La Antigonon de Anuj' estas ankoraŭ preskaŭ infano. La temo de infaneco trapasas la tutan verkon. La vorto "eta" konstante akompanas la protagonistinon. Ŝia vartistino nomas ŝin "eta kolombino" (4, 50). Kreono vidas en ŝi "etan knabinon", poste "etan furion" (4, 68), poste "etan idiotinon" (4, 71). Ŝi gardas ĝis nun sian pupon, donacon de Kreono, kaj ŝi enterigas la kadavron de sia frato pere de infana fosileto, sia ludilo... Tiuj vortoj kaj aĵoj estas simbolaj por ŝia infaneco. La aŭtoro substrekas, ke la radikoj de ŝia ribelo devenas el la infanaĝo. Ŝi ĉiam estis ribelema kaj ĉiam diris "NE". Ŝi volas nek pripensi nek kompreni: "Mi ĉion komprenos, kiam mi maljuniĝos... se mi iam maljuniĝos... sed ne nun" (1, 284).

Alia trajto de niatempa Antigonon estas ŝia plena soleco. Neniu komprenas ŝin, neniu subtenas ŝin en ŝia agado, antaŭ la morto. Eĉ la homoj kiuj amas ŝin ne kapablas kompreni kaj subteni ŝin: nek la vartistino, nek la fratino Ismena, nek la fianĉo Hemono...

La ĉefa epizodo de la verko estas la parolbatalo de Antigonon kaj Kreono. Kreono, reganto de Tebo, estas onklo de Antigonon. Li tute ne deziras mortpuni ŝin, des pli ke ŝi estas la fianĉino de lia filo Hemono. Sed Antigonon faris kontraŭleĝan, do kriman agon: malgraŭ

la malpermeso de Kreono ŝi enterigis la kadavron de sia frato. Sed ĉiuj sciis, ke Kreono estis anoncinta mortpunon kontraŭ tia faro.

Li tamen pretas kaŝi la krimon de Antigonon. Por tio sufiĉas mortigi la gardistojn, kiuj kaptis ŝin. Sed la afero komplikiĝas: Antigonon asertas, ke ŝi sciis pri la puno, kaj se Kreono liberigos ŝin, ŝi rekomencos sian faron. Kreono indikas al ŝi, ke estas absurde riski la vivon pro iu tradicio al kiu ŝi ja mem ne kredus!

Sed Antigonon daŭre persistas: se tio ne estas por la frato, ŝi faros tion por si mem. Kreono malkaŝis al ŝi tion, kion li zorge kaŝis antaŭ ĉiuj aliuloj - ne nur unu frato, sed ambaŭ fratinoj estas krimuloj: ambaŭ ekribelis kontraŭ li, ĉar ambaŭ strebis al la reĝa trono. Ili fine interbatalis kaj mortigis unu la alian. Sed la reĝo ne povis koncedi ke ekzistis tiom da perfiduloj ĉirkaŭ li. Pro tio li proklamis unu el la mortaj fratinoj nacian heroon - kaj forĵetis la kadavron de la alia kiel krimulon en la dezerton. Kreono mem eĉ ne sciis, kiu el ili estas kiu.

Antigonon estas senkonsola. Ŝi preskaŭ rezignas pri sia intenco. Kreono nun volas plifirmigi sian ŝajnan venkon. Li tial parolas pri ŝia estonta geedziĝo kun Hemono, pri feliĉo... sed per tio li selektis la plej malfavoran momenton. Aŭdante la vorton "feliĉo", Antigonon kvazaŭ ekvekiĝas el stato de tranco. Kio estas feliĉo? La vivo, kiu baziĝas sur kompromisoj kaj mensogoj? Ekzistado, kie la politiko nomiĝas "kuirejo" kaj la geedziĝo nomiĝas "satiĝo"?

Antigonon ne plu celas al kompromisoj, ŝi volas ĉion nun - kaj tion tuj: "Mi ne volas esti modesta kaj kontentiĝi per almozaĵoj, kiujn oni ĵetos al mi por bone sinkonduti. Mi volas jam hodiaŭ certiĝi pri ĉio. Mi volas, ke mia feliĉo estu same belega kia mi vidis ĝin en miaj infanaj revoj - aŭ mi mortu" (1, 317).

En tiu momento ĉio jam estas decidita: Antigonon elkreskas el sia infaneco kaj plenkonscie elektas la morton. En la fino de la epizodo ŝi eĉ elkraĉas sur la onklon sian tutan malamon kaj malestimon: "Kiom abomena vi estas kun via feliĉo! Kun via vivo, kiun vi devas ami malgraŭ ĉio. Vi, kiel hundo, lekas ĉion kion vi trovas. Jen via kompatinda, ĉiutaga feliĉo, nur necesas esti ne tro postulema" (1, 317). Ne plu restas en tiu momento io de infaneco, ŝi fariĝis sovaĝulino, kiu ne plu kapablas kontroli siajn emociojn. Ŝi volas morti pro "iĝi si mem", por fariĝi Antigonon. Se komence ŝi diris "NE" al Kreono kaj al la maljusteco, en la fino ŝi diras "NE" al la vivo, al la amo, al la



feliĉo. Nenio restas: nek espero, nek idealoj, nek kredo. De tiu vidpunkto estas malfacile konsideri Anujon "daŭriganto de antikvaj tradicioj". Lia Antigona ne plu parolas pri religiaj, familiaj, tradiciaj kaŭzoj de sia ago. Ŝi pensas kaj parolas nur pri si mem, nur en sia nomo. Ŝi estas nehaltebla en siaj egoismo kaj fiero. Ŝi ne povas vivi, ŝia destino estas morto.

Se en la antikva tragedio la popolo subtenas la protagonistinon kaj kompatas ŝin, en la verko de Anuj' neniu ŝin subtenas, la popolo postulas ŝian morton. Atendante la mortpunon, Antigona komprenas la absurdecon de sia ago. Ŝi diras: "Kreono estis prava. Terure! Nun (...) mi ne plu scias pro kio mi mortas. Mi timas... (...). Nur nun mi komprenas, kiel simple tio estis - vivi" (1, 326).

Antigona mortas pro nenio. Ŝi personigas la perdon de ĉiuj idealoj, de ĉiuj valoroj. En siaj pensoj ŝi venas al la konkludo: por doni sencon al sia vivo, necesas morti. Ŝia ribelo transformiĝas al sinmortigo. En tiu verko Anuj' estas tre proksima al la ekzistencialisma koncepto.

### Literaturo

1. *Anuj Ĵan*: Teatraĵoj (en 2 volumoj). Vol.1, Moskvo, 1969.
2. *Baĉelis T.I.*: Intelekta teatro. Nuntempa eksterlanda teatro. Skizoj. Lukto de ideoj kaj skoloj. 1969. Redaktoro: *B.I. Zingerman*, Moskvo.
3. *Vetikovskij S.*: La limoj de malfeliĉa konscio. Moskvo, 1973.
4. *Kott J.*: Greka tragedio kaj absurdo. Nuntempa dramverkaro. Moskvo, n-ro 6, 1990.
5. *Anouilh Jean*: *Antigone. Théâtre français d'aujourd'hui. Vol. 1*, Moskvo, 1969.
6. Sofoklo: Dramverkoj (traduko de *Zelinskij*, Moskvo, 1990).

### Adreso de la aŭtorino

S -ino *ĤALIKOVA Irina*  
p.a. Baŝkiria Ŝtata Universitato  
str. *Bluhera 10, kv. 47*  
RUS - 450075 - Ufa / RUSIO

### Priaŭtoro informo

La aŭtorino estis studentino, nun "konkurantino", ĉe Baŝkiria Ŝtata Universitato en Ufa, Rusio.

### Raporto

## Esperanto ĉe *SILF*

### Nova ideo: ĉu paralela du-ebena lingvosistemo por Eŭropa Unio?

La *Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle (SILF)* aranĝis (2001-04-04/08) en la Eŭropa Universitato *Frankfurt/Oder* (Germanujo) sian XXV-an internacian kolokvon (laborlingvoj: franca, germana, angla).

La temaro de Sekcio 1 (**Lingva politiko**) invitis la lingvistojn, proponi respondojn al jenaj demandoj:

1. Kiel komunikos la diverslingvanoj en EU?
2. Ĉu Eŭropo povas kontentiĝi per unusola vehikla lingvo, la angla?
3. Kiuj estus la konsekvencoj por la ceteral lingvoj?
4. Kiu alternativo al la angla?

En mia referaĵo "**La plureco de la lingvoj kaj/aŭ neŭtrala lingvo**" mi pledis por Esperanto kaj, kiel alternativon al la angla, prezentis **la koncepton de profesoro I.F. Bociort pri paralela du-ebena lingvosistemo** por Eŭropa Unio.

Jen la esenco de tiu koncepto:

Ĉi-momente la angla estas nek tute evitebla, nek kiel sola vehiklo akceptebla.

Ni tial pripensu kulturhistorian sugeston: dum la mezepoko, la latina lingvo en okcidenta Eŭropo, la malnovslava en pluraj (sud-)orientaj Eŭropaj landoj (en filozofio, eklezio, scienco, oficialaj dokumentoj) funkciis paralele kun la naciaj lingvoj evoluantaj.

En Grekujo, Ĉinio kaj aliaj landoj dum kelkaj jarcentoj funkciis paralele du kulturlingvoj: malnova, tradicia lingvo (ekz. en beletraĵo) kaj alia "nova", pli demokratia lingvo.\*